

BACCALAURÉATS GÉNÉRAL ET TECHNOLOGIQUE

SESSION 2018

ESPÉRANTO

Examen blanc

Toutes séries générales et technologiques

Durée : 2 heures

**Le candidat traitera, dans la langue étrangère,
l'ensemble des questions de l'épreuve pour laquelle il compose.**

L'usage des calculatrices électroniques et du dictionnaire est interdit.

Dès que ce sujet vous est remis, assurez-vous qu'il est complet.

Ce sujet comporte 3 pages numérotées de 1/3 à 3/3.

Répartition des points

Compréhension de l'écrit	10 points
Expression écrite	10 points

Mi (Manfred) ekbiciklas, kaj post unu horo kaj duono mi atingas la urbon Ludwigsburg, kie granda nombro da afiŝoj, flagoj kaj rubandoj anoncas la aranĝon. Mi parkas mian biciklon, eniras en la kastelan korton kaj vidas tie milon aŭ eĉ plurajn milojn da homoj. Ĉe la rando de tiu korto staras dudeko da informstandoj, el kiuj preskaŭ la duono aspektas forlasite.

5 Ĉe kelkaj aliaj standoj mi vidas ofertojn, kiuj ŝajnas al mi komercaj: du semajnojn da lingvo-lernaj ferioj en Francio por nur 1200 germanaj markoj... Subite mi ekvidas pli interesan standon: “ESPERANTO – la Internacia Lingvo”, mi legas, skribite en blankaj literoj sur verda rubando, kaj iras tien. Jam antaŭ ol atingi tiun standon, iu knabo enmanigas al mi oranĝan flugfolion kun la titolo: “Interkompreniĝo sen limoj”. Mi iom miras, ĉar ĝis nun mi pensis, ke Esperanto estas nur iu
10 ŝatokupo de kelkaj plejparte maljunaj homoj, sed nenio serioza. Iam mi vidis en televida novaĵ-elsendo mallongan raporton pri iu Esperanto-kongreso, kaj iam mi supraĵe legis en iu gazeto artikolon pri tiu lingvo kun foto pri la maljuna barbulo, kiu inventis ĝin. Sed mi vidas, ke grupo da gejunuloj vigle engaĝiĝas por tiu lingvo... devas do esti interesa afero.

Mi iomete rigardas la standon de certa distanco, vidas kelkajn librojn kaj gazetojn, sed decidas
15 unue retropaŝi iomete kaj tralegi la flugfolion. Mi legas ion pri internaciaj junularaj renkontiĝoj, en kiuj oni parolas nur Esperanton, kaj ekscias ion pri la lingvo mem: ke ĝi havas simplan gramatikon sen esceptoj kaj vortfaradan sistemon; ĝi do estas facile lernebla. Estiĝas en mi la ideo, ke tiu lingvo povus esti bona solvo por la lingva problemo en la mondo. Sed, se ĝi estas, kial oni ankoraŭ ne instruas ĝin pli vaste? Se ĝi ne estas, kial tiuj gejunuloj tiom entuziasme engaĝiĝas por ĝi? Verŝajne
20 tiu lingvo simple estas ankoraŭ ne sufiĉe konata. Ekzemple mi ja preskaŭ nenion sciis pri ĝi ĝis nun. Mi denove alproksimiĝas al la stando kaj komencas rigardi la titolpaĝojn de la libroj, gazetoj kaj lernolibroj kuŝantaj tie. Subite alparolas min knabino staranta malantaŭ la stando:

“Esperanto estas lingvo, kiun oni parolas ĉie en la mondo. Ĝi estas facile lernebla kaj mult-
maniere aplikebla. Ni uzas ĝin en internaciaj junularaj renkontiĝoj, kaj ekzistas listo, per kiu vi pov-
25 as senkoste tranokti ĉe homoj en 54 landoj...” Kaj ŝi montras al mi verdan adreslibron, kiun mi mallonge trafoliumas, rigardante precipe la mapojn ĉe la fino.

Fine ŝi diras ion en tiu lingvo al nigrabarulo staranta apud mi. Tiu alparolas min, demandante min
francalingve, ĉu mi komprenas la francan. “Iomete”, mi respondas samlingve, kaj ni iom interparolas
pri niaj nomoj, loĝlokoj kaj poste pri Esperanto. Vidante miajn malfacilaĵojn esprimi min en la
30 franca, mi diras: “L’espéranto est plus facile”, kaj ni ridetas iomete. Envie mi rigardas, kiel flue la knabino malantaŭ la stando interparolas kun tiu franco.

El Fajron sentas mi interne, Ulrich Matthias, romano originale verkita en Esperanto (1990).

EXAMEN BLANC

I. COMPRÉHENSION DE L'ÉCRIT (10 points)

A. COMPRÉHENSION

1. Kio troviĝas ĉe la rando de la kastela korto?
2. Pri kio Manfred interesiĝas tuj post sia alveno?
3. Kion unue legas Mandred?
4. Kio okazas kiam Manfred rigardas la titolpaĝojn de la libroj, gazetoj kaj lernolibroj kiuj kuŝas sur la stando?
5. Kun kiu Manfred parolis france?

B. TRADUCTION

Traduku al la franca la sekvan parton: de “Jam antaŭ ol atingi tiun standon, ” (linio 8) ĝis “devas do esti interesa afero. ” (linio 13).

II. EXPRESSION ÉCRITE (10 points)

Traitez l'un des deux sujets. (entre 100 et 150 mots) :

1. Ĉu vi pensas ke junuloj estas bone informitaj pri la lingvaj problemoj en la mondo? Laŭ vi, kiel eblus plibonigi la situacion?
2. Kio estas la diferenco inter internaciaj renkontiĝoj kie partoprenantoj parolas la internacian lingvon Esperanto kaj internaciaj renkontiĝoj kie partoprenantoj ne parolas tiun lingvon?